

Mesaĝo de Universala Esperanto-Asocio okaze de Internacia Tradukada Tago, 30 septembro 2020

Kiam en la jaro 2017 la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj starigis la Internacian Tradukadan Tagon, ĝi rekonis la apartan gravecon de lingva komunikado en internaciaj aferoj ĝenerale kaj en Unuiĝintaj Nacioj specife.

Jam multe tro longe ni ignoras la gravecon de lingvaj demandoj, la fundamento de komunikado. Malsameco de lingvoj povas esti uzata por fortranĉi homojn el komunikado, kiel ilo de maljusta diskriminacio, kiel maniero silentigi tiujn kiujn ni ne volas aŭdi, kaj kiel maniero fortigi iujn homojn kaj malfortigi aliajn. Malmultaj aferoj estas pli gravaj por UN ol ĝia lingvopolitiko.

Tradukistoj kaj interpretistoj estas ŝlosilaj agantoj por egaligi lingvan diferencon, komunikiĝi trans lingvaj bariloj, kaj liveri al ĉiuj ties voĉon kaj la eblecon aŭdigi sin. Ili laboras malantaŭ la kulisoj – kaj ne nur en budoj kaj oficejoj sed ankaŭ en packonserva laboro kaj en militaj zonoj.

Laŭdante la laboron de tradukistoj kaj interpretistoj, Universala Esperanto-Asocio alvokas al Unuiĝintaj Nacioj pli proksime ekzameni la malfacilaĵojn kaŭzatajn de lingva diferenco kaj la gravecon serĉi inkluzivajn kaj egaligajn solvojn – inter ili la Internacian Lingvon Esperanto, kiu ligas milionojn da homoj tra la mondo en ekvilibra kaj malferma komunikado.

Ni bonvenigas la klopodojn forigi la lingvajn barilojn al egaleco de komunikado kaj ni salutas la tradukistojn kaj interpretistojn de Unuiĝintaj Nacioj okaze de Internacia Traduka Tago.

Office of the Universal Esperanto Association at the United Nations
777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.
212-687-7041